

Al niaj abonantoj!

Ni kore petas ĉiujn niajn abonantojn

1:e **pardonu** ke nia gazeto eliris iom neregule en 1896:a jaro; la mal-facilaĵoj estis multaj kaj diversaj, kaj ni ne povis ĉiujn superi; sed se ni ne estis tute akurataj ni tamen donis al niaj legantoj multe pli da legaĵo ol ni komence promesis (236 paĝoj anstataŭ 144).

2:e esperi ke nia gazeto en 1897 eliros tute regule kaj tial plej eble **baldaŭ aboni**; ni bone aranĝis por tiu ĉi jaro la eldonadon de nia gazeto kaj povas certigi ke, kiom de ni dependas, ĝi estos senkulpe regula; jam ni havas la sperton kaj la rimedojn, kiuj kelkfoje mankis en 1896.

3:e **altiri al ni almenaŭ unu novan abonanton**; se ĉiu el niaj malnovaj amikoj altiras al ni nur **unu** novan, ni ja povos por 1898 eldoni la gazeton ĉiuj 14 tagoj **sen altigado de la prezo**. Kaj jam en tiu-ĉi jaro ni tiam povos plibeligi nian gazeton per ilustracioj k. e.

Tial: pardonu la neakuratecon en 1896, esperu akuratecon por 1897, abonu la gazeton, varbu almenaŭ **unu** novan abonanton! — Ĉiu kiu varbas 4 abonantojn ricevas la kvinan ehzempleron por li mem **senpage**. — De ĉiuj numeroj por 1896 restas ankoraŭ kelkaj ekz., kiuj kune kun la prova n:o (dec. 1895) estas riceveblaj por kr. 2 (rub. 1; fr. 2,75; m. 2,20, k. e.) de la redakcio kaj de niaj agentoj en diversaj landoj: Por la poŝta transsendo almetu kr. 0,40 (kop. 20, centimoj 30, k. e.). Por apartaj n:oj oni pagas kr. 0,20. Ĥĉetu kaj transdonu al viaj amikoj!

Kun vera estimo.

Redakcio de l' gazeto **Lingvo Internacia.**

Uppsala.

(Svedujo.)